Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
ĝiro 547-1044

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj de Dana Fervojisto:

15/9-2013
1/11-2013

Enhavo:


| | |
|---|---|
| pağo 2 | DEFA ĝeneral-kunveno 2013 |
| pağoj 3-5 | Temo de la jaro |
| pağo 6 | Forpasoj |
| pağoj 7-8 | Aktivecoj |
| pağoj 9-14 | La 65ª IFK |
| pağo 15 | Vojaĝkarto en Tallinn |


## 66ª IFK – majo 2014




Ne forgesu … aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe la prezidanto,




# Dana Fervojisto 2

ISSN: 1397-9914

66a jareldono Julio 2013



*Urbdomo en Artigues-près-Bordeaux,*

*vidu pp. 9 (fotis Jan Niemann)*

# DEFA ĜENERALKUNVENO 2013

okazis en Køge ĉe Astrid kaj Erik la 3an de julio post multaj prokrastoj pro malsano, ferio ktp. Finfine ni sukcesis, kaj kvankam la statutoj diras, ke ĝi okazu antaŭ la IFEF-kongreso, ni esperas, ke la membraro pardonpetas pro la malfruo.

Intertempe ni havis sufiĉe da okazoj por diskuti kelkajn statutŝanĝojn. Ĉefe estis kosmetiko, ĉar la fervoja libertempa asocio DJF ŝanĝis sian nomon al Jernbanefritid, sed estis unu signifoplena afero por ni: la asocion reprezentas nun la prezidanto aŭ la kasisto, same kiel ili ambaŭ (unuope) povas elpreni monon de la bankkonto.

Niaj aktivecoj estas limigitaj pro manko da laborfortoj, sed ni strebas ion fari, kaj la ĉeestantoj esprimis kontenton pri tio. Ankaŭ por la venonta kongreso de IFEF en Italio ni klopodos verki etan fakprelegon.

Rilate al ekonomio la ĝeneralkunveo decdis daŭre pagi IFEF-kotizon por 15 membroj por havi voĉdonrajton en la IFEF-komitato. 'Hejme' en DEFA la kotizo estos ekde 2014 senpaga.

Ĉiuj elektoj estis reelektoj, kaj. cetere estis agrabla kaj ujutna kunestado.

La plena protokolo, la bilancraporto kaj la novaj statutoj haveblas ĉe la sekretario.

Lene Niemann, sekr.



# VOJAĜKARTO en Tallinn

Dum ferio en Estonio ĉi-somere ni pasigis unu semajnon en la ĉefurbo Tallinn. Tie loĝas ĉ. 410.000 homoj, kaj venas multaj turistroj al la urbo, kiu havas longan kaj draman historion ... tie regis i.a. danoj, balt-germanoj, svedoj kaj rusoj.

Nun, ekde 1991 la lando estas denove libera, ekde 2004 membro de Eŭropa Unio kaj en 2011 oni anstataŭis la esonan valuton krono per eŭro. Oni faris tre rapidan evoluon en multaj rilatoj, kaj ankaŭ 'publik-transporte' oni estas 'antaŭ ni'.

En Tallinn ekde la unua de januaro 2013 estas senkoste veturi per publika transporto por tiuj, kiuj loĝas en la urbo – indiĝenoj aŭ eksterladanoj, kiuj havas permanentan adreson. Per identec-karto, kiun oni uzas por voĉdonado, bank-aferoj ktp. (kiam oni aŭdas pri tiu sistemo, oni vere sentas, ke ni estas malantaŭe ...), oni ankaŭ vojaĝas. La sistemo estas kiel la dana REJSEKORT – la diferenco estas, ke ĝi validas nur en la ĉefurba regiono. Oni 'montras la karton' al skanilo, la 'pling-sono' kvitancas, ke la maŝino legis la karton. Verŝajne oni uzas tion por fari statistikon, ĉar estas ja senkoste, kaj oni ne eltiras monon por bileto.

Por 'ni aliaj' ekzistas 'verda karto', kiun oni aĉetas por 2 EUR (por la karto mem), kaj oni povas do 'meti monon' aŭ 'meti tagbiletojn' sur ĝin. Tion ni faris – kiam ni alvenis, ni metis 5 EUR, kaj ni veturis de la lughaveno al la urbocentro kaj poste ankoraŭ al iu vidindaĵo. Post du tagoj ni aĉetis/metis 5-tagan bileton, kaj poste, kiam ni 'montris' la karton al la skanilo, ĝi kvitancis '15a de junio – 2,80 EUR'. T.e.: Validas ĝis la 15a de junio, kaj post tio restos 2,80 EUR.

Ĉio funkcias teknike, kaj la trafiko glate iras – nenio pri temporaba biletaĉeto, 'kart-montrado' ĉe eliro kaj monŝanĝo ĉe la ŝoforo, nur 'pling'-sonoj kaj gajaj pasaĝeroj. Impona afero!

JUN+LEN

Impona afero ... kaj certe ankaŭ en tiu flanko de la kongreso helpis la fakto, ke ni estis kune du grupoj – oni povas 'aĉeti' pli multekostajn artistojn kaj organizi pli grandajn spektaklojn.

Ekskursoj
Verŝajne la plimulto de la kongresanoj esperis konatiĝi kun la bela regiono kaj gustumi ties vinon, kiu estas fama – kaj la petoj estis plenumitaj per la ekskursa programo, kiu estis varia kaj abunda. La plimulto partoprenis unu aŭ plurajn ekskursojn kaj cetere esploris Bordozon dum 'propra' ekskurso per buso kaj tramo.

Amikaj kunestadioj
Jen – grava, eĉ gravega punkto. Ni ĉiuj ĝojas vidi la konatajn vizaĝojn dum la interkona vespero aŭ dum la unua kongresa tago, ni ĉiuj ĝuas esti kune kun la amikoj dum la kongresa semajno kaj kune sperti pri la kongresaj eroj, kaj ni ĉiuj estas kaptitaj de melankolio, kiam ni devas adiaŭi. Ni jam antaŭĝojas revidi kiom eble plej multaj en San Benedetto del Tronto en majo 2014.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis tiun kongreson en bela suda Francio.

J&L Niemann, k-numeroj 7 kaj 43, DEFA



Plusa sperto: dum vicostarado en la memserva restoracio oni babilis!



## Temo de la jaro

Ankaŭ por 2013 ni sukcesis decidi pri temo ... ni elektis SAMIDEANOJN. En Esperantio ni multe parolas pri samideanoj – ni ja ĉiuj estas – sed ni trovis kvar personojn ekster Esperantio, kiuj estas kun Zamenhof samtempuloj (proksimume) kaj samideanoj – en la senco, ke ili volis la pacon kaj ĉiu en sia maniero laboris pri tio. Do, antaŭĝoju konatiĝi kun kelkaj interesaj kaj por la mondo signifaj personoj.

## Patro de modernaj Olimpikaj Ludoj – Pierre de Coubertin

Pierre de Coubertin naskiĝis en 1863 en nobela familio en Francio. En lia familio oni okupis sin pri arto kaj literaturo, kaj estis sufiĉe da mono. La juna viro ne bezonis labori, sed li interesiĝis pri la eduko de junaj homoj kaj trovis inspiron en la britaj internulejoj (ekz. Eton kaj Rugby), kiujn li vizitis, kaj kie sporto estis parto de la ĉiutago.

Li ekhavis la ideon, ke junaj homoj per la sporto povus lerni pri ecoj kiel kuraĝo, konfido kaj decidemo. En 1894 li lanĉis la ideon reeviviGi la Olimpikajn Ludojn, kiel oni konis ilin de antikvaj tempoj. La Internacia Olimpika Komitato stariĝis, kaj en 1896 oni okazigis la unuajn modernajn olimpikajn ludojn en Grekio, kie ili okazis en la fora pasinteco.

Oni fomulis 'olimpikan leĝon', kiu klarigas, kio estas la olimpikaj ideo kaj movado, kaj kiel oni aranĝu kaj organizu la olimpikajn ludojn. Fakte antaŭ la streboj de Coubertin pli ol 20 fojojn personoj provis revivigi la oplimpikajn ludojn, sed fariĝis nur sufiĉe magrandaj aranĝoj dise en la mondo. La ludoj de Coubertin estis INTERNACIAJ, estis klaraj reguloj, kaj cetere estis certa kvanto de filozofio, nome LA OLIMPISMO.

La idearon OLIMPISMO, kiu estas bazo de la modernaj olimpikaj ludoj, priskribis de Coubertin. Se oni faras sporton laŭ certaj, fiksitaj reguloj kaj leĝoj, oni lernas defii sin mem, korpe kaj anime, kaj en la internaciaj ludoj oni lernas respekti aliajn homojn, - oni lernas pri komprenemo, amikeco, honesteco kaj helpemo.



Pierre de Coubertin, 1863-1937

Tiuj ideoj ESTAS la olimpismo – kaj tiel junaj homoj laboru por pli bona kaj paca mondo. Per la renkontoj ĉiun kvaran jaron la Olimpikaj Ludoj povus helpi al paco kaj interkompreno inter homoj.

De Coubertin estris la Internacian Olimpikan Komitaton de 1896 ĝis 1925.

Pierre de Coubertin neniam edziĝis kaj neniam havis infanojn. Biografisto skribas, ke li 'estas la lasta kun la familia nomo, kaj la sola de tiu familio, kies famo vivos longe post li.'



Fakaj diskutoj kaj prelegoj
Pro la 'du kongresoj kune' estis pli da fakaj prelegoj ol kutime. Kadre de la IFEF-kongreso ni havis la aktualajn prelegetojn de diversaj landoj (entute tri) kaj la ĉef-fakprelegon, kiun preparis kaj prezentis Michel Lafosse, sed pluso estis pluraj aliaj prelegoj, kiuj TEMIS pri fervojoj, sed kiujn prezentis ne-fervojistioj. Estis bone vidi la fervojon ankaŭ de ne-fakula vidpunkto, kaj supozeble tiu varieco donis pli grandan publikon al la fakprelegoj entute.

Kultura programo
Ni ofte spertis, ke la francoj faras bonan kulturan programon por iliaj aranĝoj. Ni partoprenis kelkajn kongresojn kaj cetere kelkajn skisemajnojn, - ĈIAM kun bona kultura programo. Ankaŭ en Artigues. Koncertoj, spektakloj, kvizo-ludo, ... kun granda partopreno de la loka teatra kaj kanta grupo de Esperanto-Gironde (Kompanoj), sed ankaŭ Interkant' kaj Kajto prezentis altkvalitajn programojn.



Kajto distras dum ekskurso




Faka ekskurso al la tramriparejo

Por ni estis bona afero esti en unu loko kun mallonga distanco inter loĝejo kaj kunvenejoj, kie ĉiuj estas ĉiam (preskaŭ) kune – tio donas la por ni ĝustan kongres-atmosferon.

La semajno plenis de la 'kutimaj' programeroj:

Organizaj aferoj

La kongreso estas ja kvazaŭ 'ĝeneralkunveno' por IFEF. La estraro gvidas la ĉiutagan laboron kaj bone eluzas la eblecon, kiun donas la interreto kontakti rapide unu la alian dum la jaro, - sed tamen estas bone vidi unu la alian kaj diskuti la gravajn aferojn, kiam oni sidas en la sama ĉambro.

La komitatkunsido kaj la plenkunsido estas gravaj eroj de la vivo de la asocio, precipe en tiuj jaroj, kiam malkreskas la membronombro kaj abundas la defioj – estas bone esti kune por vere ĵeti ĉiujn ideojn sur la tablon kaj prijuĝi ĉiujn eblecojn kaj proponojn.





Statuo de Coubertin (la bildo) troviĝas en *Centennial Park* en *Atlanta* (Usono), kie okazis la Olimpikaj Ludoj en 1996, 100 jarojn post la unuaj (en modernas tempo) en Ateno. Multaj antaŭvidis, ke ankaŭ en 1996 la Ludoj okazui en Grekio por honori la antikvan tradicion; aliaj diris, ke estas tute nature, ke la Olimpikaj Ludoj 1996 okazis en Atlanta ... ĉar Coca Cola regas!

Verdire, ĉiam dum kaj post Olimpikaj Ludoj oni aŭdas pri malhonesteco, malpermesita medicino kaj forpreno de medaloj (eĉ multajn jarojn poste), sed certe s-ro de Coubertin estis honesta kaj havis bonajn idealojn.




Fonto: Vikipedio



**Inge Sørensen**
**1931-2012**

**Irving Sørensen**
**1921-2013**

Inge kaj Irving, geedzoj dum 40 jaroj, ĉiam agis kune – oni ne povas imagi al si unu sen la alia. Tamen, post la morto de Inge Irving vivis ankoraŭ unu jaron.

Sed ĉar ni konis ilin kiel paro, kaj ĉar ni ekciis pri la morto de Inge nur en konekso kun la forpaso de Irving, jen nia lasta saluto al ili du.

Loĝantaj ĉe Kopenhago ili ambaŭ dum multaj jaroj aktivis en la tiea fervojista klubo. Irving laboris en la ĉefriparejo de DSB ĉe Dybbølsbro kaj tie al la kolegoj rakontis pri la eblecoj kaj belaj travivaĵoj, kiujn donas Esperanto. Krom en la hejma klubo la paro partoprenis internaciajn kongresojn kaj aranĝojn kaj havis multajn amikojn, el kiuj la infanoj de la paro eĉ nun memoras kelkajn de personaj vizitoj.



... do, entute tre taŭga kongresjo, kie oni povis ĉion fari en unu loko sen transporti sin multajn kilometrojn plurfoje tage.



La kongresejo kaj unu el la kunsidoj de IFEF

Ankaŭ estis tempo por privataj ekskursoj – en lageto en la Botanika Ĝardeno franca rano diris: 'Kvavak, kvavak, kvak-kvak-kvak.'





Post la inaŭguro ... la tradicia komuna foto

Ambaŭ organizoj profitis de tiu aranĝo. Ni kune pli multis ol solaj, - ni estis entute ĉ. 230 personoj. La prelegoj estis pluraj kaj pli variaj, ol ni povus sole fari ... laŭ fakaj temoj kaj laŭ aliaj temoj. Kaj, ne malpli grave, ni ĉiuj – de ambaŭ flankoj – renkontioĝis ne nur kun amikoj jam konataj, sed ankaŭ kun NOVAJ AMIKOJ. Kiel oni diras en nia moderna mondo: estas gajno-gajno-situacio.

La elektita kongresloko en Artigues, *Maison de la Promotion Sociale*, situas ĉ. 10 km for de Bordozo kaj iom ekster la urbeto *Artigues*, en industri-kvartalo. Do, ne estas tre interesa ĉirkaŭaĵo aŭ allogaj gastejoj aŭ vididaĵoj proksime. Estas bushaltejo tuj ekster la centra pordego kaj tramhaltejo malpli ol unu kilometron for.
La centro konsistas el

- loĝdomoj, kie multaj kongresanoj loĝis (por tiuj, kliuj ne volis loĝi en la centro mem, estis hoteloj proksime)
- kongresejo taŭga kun TRE helpema kaj servopreta (kaj bona) teknikisto; mi miras, ĉu li dormis dum la semajno
- memserva restoracio



Kiam Inge kaj Irving translokiĝis al Vejle, ili multege laboris pri organizo de la 37a IFEF-kongreso en 1985 – sen ili tutcerte ne estus la kongreso same sukcesa. Ankaŭ en la loka DEA-klubo en Vejle ili estis aktivaj membroj.

Inge kaj Irving vivis kune en harmonio, pripensis la sanon, estis ĉiam fidelaj al belaj ideoj kaj principoj kaj neniam preterlasis eblecon esti kune kun bonaj amikoj.

Niaj dankemaj pensoj iras al ili kaj al iliaj infanoj.

Ke ili ripozu en paco.

DEFA

## Aktivecoj de DEFA:

Ekde septembro ni denove kunvenos unufoje monate. La kunvenoj okazas en Køge ĉe Astrid kaj Erik aŭ en Næstved ĉe Karen. Ni renkontiĝas je la 18-a horo, kune manĝas, pritraktas taskojn, kiujn sendas Heinz Hoffmann pri terminologiaj aferoj, kaj ni strebas fari artikolojn por IF kaj Dana Fervojisto kaj prezentojn por la venontjara kongreso.

Momente neniu dato estas ankoraŭ fiksita, - por pliaj informoj turnu vin al la prezidanto.

## Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

### Kopenhago

***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: Peter Wraae, tel 46 49 60 16, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en Kulturhuset, Toms-gårdsvej 35, 2400 Kbh NV. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

**Århus**

***Kontaktulo pri DEFA*:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en Seniorcentret, Østergade 30, dua etaĝo je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

# DEFA ekskursos



Dana Fervojmuzeo, Odense. Fonto: Dana Fervojuzeo

En septembro aŭ oktobro DEFA ekskursos per trajno al la dana fervojmuzeo en Odense. Ni antaŭvidas planon pli-malpli tiel:

Ni renkontiĝos 'en trajno' por alveni en Odense ĉ. tagmeze. Ni kune lunĉos en Banegård Centret kaj poste iros viziti la fervojmuzeon. Antaŭ hejmeniro ni trinkos kafon.


Pri preciza dato, horaro kaj programo vi povas turni vin al la prezidanto.



## La 65a IFK okazis en Artigues-près-Bordeaux 4.-11. de majo 2013

En pluraj kazoj jam la IFK okazis kiel kunlabore kun loka esperanto-klubo. La laborfortoj en IFEF ne multas, tion ni scias, kaj tion ni diskutis dum multaj kunvenoj, kaj estas bona solvo kolekti fortojn por fari la laboron, tiel ke ni daŭre povas okazigi niajn kongresojn. Multaj partoprenantoj esprimas, ke tiuj kongresoj gravas:

- oni renkontiĝas kun amikoj, kiujn oni dum multaj jaroj konas
- oni aŭdas pri fakaj novaĵoj kaj diskutas fakajn terminojn kaj apikojn, kiuj apartenas al 'nia tereno de esperanto-faklaboro'
- oni konatiĝas kun nova lando, nova regiono, nova urbo per la eksursoj kaj per la kultura programo



Je la alveno en la stacidomo en Bordozo – ni estis akceptataj kaj akompanataj al la kongresejo.

Ankaŭ ĉijare la kongreso de IFEF estis rezuto de kunlaboro, nome inter la franca esperanto-asocio UFE kaj IFEF, kaj estis ne nur kunlaboro, estis KOMUNA KONGRESO. La IFEF-kongreso daŭris unu semajnon, kiel kutime, de sabato ĝis sabato, kaj ekde merkredo estis ankaŭ programeroj de la UFE-jarkunveno.